6-a Jaro — Majo 1931.
N-ro 1 (27). — *Aperas dumonate.*

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

**Kaspar Mayr.** La malarmado. — **Internacia Junulara Agado** (Katolika junularo — la skoltoj — hebrea junularo — socialista junularo — komunista junularo — anarkiista junularo — pacifista junularo). — **Pastro Grafo Jan Rostworowski S. J.**, Benataj estu la pacigantoj! — Junularo en Okcidenta Afriko. — Novaj vojoj de la edukado en Afriko. — Komunismo kaj junularo en la Ekstrema Oriento. — **Gravaj internaciaj kongresoj kaj kunvenoj 1931. — Nia movado. — Esperanto en la servo de la internacia katolika agado.**

REDAKCIO : **Köln, Dagobertstrasse, 28, Germ.**

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO, Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germ. (Regina Reiff).

Presejo: Imp. DISONAISE. S. Wigandy. Dison. Tel. 1398.

# Abonprezoj de “ La Juna Batalanto „

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

| Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simola kotizo | Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Anglujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Hungarujo | 2,4 p | 4 p | 2 p |
| Argentino | 1,50 p | 2 p | 1 p. | Italujo | 9 l | 14 l | 5 l |
| Azio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Japanujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d |
| Aŭstralio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Jugoslavujo | 30 din. | 40 d | 15 d |
| Aŭstrujo | 3.40 s | 5 s | 2 s | Litovujo | 5 lit. | 7 l | 3 l |
| Belgujo | 3,50 b | 6 b | 2 b | Luksemburgo | 18 fr | 25 fr | 10 fr |
| Brazilio | 4 mr | 5 mr | 2 mr | Meksiko | 0,50 dol | 0,75 d | 0,30 d |
| Ĉeĥoslov. | 16 kr | 20 kr | 10 kr | Nederlando | 1,25 fl | 2 fl | 0,80 fl |
| Danujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr | Polujo | 4 zl | 6 zl | 3 zl |
| Danzig | 2 g | 3 g | 1.20 g | Portugalo | 8 esc | 12 e | 5 esc |
| Francujo | 12 fr | 18 fr | 6 fr | Rumanujo | 80 lei | 100 l | 40 lei |
| Germanujo | 2 M | 3 M | 1.20 M | Svedujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr |
| Grekujo | 38 dr | 50 dr | 15 dr | Svisujo | 2.50 fr | 4 fr | 1,50 fr |
| Hispanujo | 3 p | 4.50 p | 2 p | Usono | 0,50 dol | 0,80 dol | 0,30 dol |

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

*Abonejoj :* Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

*Poŝtkontoj.* Germanujo : Köln 480 37 (Wilh. Solzbacher, Köln) ; Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine) : Aŭstrujo: Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer).

**POR PROPAGANDI NIAJN IDEOJN** en la katolika junularo tutmonda, MOKA eldonas propagandgazetojn nacilingvajn. Ili devas enpenetri ĉie en la rondojn kaj asociojn. Ĉiu propagandisto portu daŭre kvanton en sia poŝo, por disdoni aŭ disvendi ilin.

« **ERWACHENDE JUGEND** » nomiĝas la **germanlingva** bulteno aperanta dumonate. Jara abonprezo : 1.20 RM. Propagandcele (sed oni tiam nur forsendas minimume 25 ekz.) ĝi kostas po ekzemplero **nur 3 feningojn!** Eldonejo : Verlag Erwachende Jugend, **Werl** (Kr. Soest), Germ.

« **LA JEUNESSE MONDIALE CATHOLIQUE** » **estas** destinata por niaj **franclingvaj** amikoj kaj kostas **nur 1 francan frankon** por 10 ekz., 4 fr. por 50, 7 por 100 ekz. Mendu tuj !

**En angla kaj hispana lingvoj** similaj bultenoj estas nun preparataj. Interesuloj jam nun mendu ĉe la Eldona Kooperativo J. B. aŭ ĉe la kompetenta nacia sekretariejo.

# LA MALARMADO

De Kaspar Mayr, Wien.

Proksimiĝas la granda Malarmada Konferenco de Genève, kies signifo por la tutmonda paco estos decida. Nia amiko Kaspar Mayr montras la problemon, la malfacilaĵojn kaj la faktojn. RED.

*Tutmonda batalo.*

Je la unua fojo en la historio de la homaro la potencoj de la mondo kunvenas, por intertraktadi, kiel ili *libervole* formetu armilojn kaj mortiginstrumentojn. Pli ol 50 ŝtatoj partoprenos, dum ke ekz. la unua Haga Konferenco kalkulis nur 26. Ĝis nun la venkintoj forŝiris la armilojn de la venkitoj, la fortuloj de la malfortuloj. Ĉu ni povas esperi, ke nun la fortuloj libervole almenaŭ parte formetos siajn armilojn? — Estas certe, ke la unua paŝo en realeco fariĝos nur tro modesta, ke neniu ŝtato estas preta, rezigni je la potenco de siaj armiloj en la intereso de la homaro kaj konstrui sian politikon nur sur la potenco de la justeco. Tamen la fakto, ke la politikistoj sub la premo de la nacioj komencas klini sin al pli alta spirita principo, al la aŭtoritato de la juro, signifas novan trapuŝon de la pacideo tra la muro de la kredo je la potenco, kiu ĝis nun ĉirkaŭtenis la popolojn. Ankoraŭfoje la potencoj de la malamo, de la profito (militindustrio!), de la regemo kaj de la timo leviĝos por giganta batalo — milito kaj paco batalos inter si pri la venko en la tuta mondo.

*Ĉu malarmado aŭ limigo de la armado ?*

« La altaj kontraktantaj partoj promesas limigi siajn armadojn kaj laŭeble malpliigi ilin.» Tio estas la unua paragrafo de la nuna projekto de la Malarmada Komitato. Do estas du tute malsamaj taskoj, kiujn havas la Konferenco, la unua: limigo de la armadoj al ilia nuna stato, kaj la alia: ilia malpliigo «laŭeble». La malarmado en ĝia strikta senco, do la forigo de ĉiuj militarmiloj, por organizi la internaciajn rilatojn nur sur la bazo de la juro kaj konservi nur policon, tute ne estas intencita ĉi tiun fojon. Sendube tio estas la plej granda malforto de la Konferenco.

Eventuale tamen jam estas progreso, se oni provizore sukcesas, stabiligi la nunan staton de la armado kaj malpermesi pluan plifortigon. Per tio estas malhelpata por la proksima tempo la nova konkurado en la armado kaj tiel estas forigata unu el la plej danĝeraj militkaŭzoj. La konkurado en la armado de la nacioj ja ne nur konstante incitas la popolojn unu kontraŭ la alia kaj instigas la batalinstinktojn — ĝi estas ankaŭ por la profitgajnantoj de la militindustrio kaj la militaristoj la plej favora okazo, por pliigi la armadojn ĝis la plej ekstrema ebleco, ĝis kiam fine eksplodo de milito estas kvazaŭ neevitebla.

*La devo.*

Estas nekontraŭdireble, ke ĉiuj ŝtatoj estas devigataj al nepra malarmado. Tio ne nur estas morala devo al la mortintoj de la mondmilito, sed ankaŭ al ĉiuj nacioj — venkitaj kaj venkitaj.. Plej altaj aŭtoritatoj, ekz. la postuloj de Wilson kaj la leteroj de Papo Benedikto XV-a, kun aprobo de ĉiuj militintaj nacioj rekonis kiel moralan konsekvencon de la granda milito la absolutan malarmadon, t. e. «tiom, kiom ĝi estas konformigebla kun la civila protekto de la loĝantaro». Tiu postulo trovis juran esprimon en la Statuto de la Ligo de Nacioj (paragrafoj 1-8), laŭ kiu eĉ estas kondiĉo por la akcepto de novaj membroŝtatoj, ke ili respektu la maksimumon de armado fiksita de la Ligo. Do laŭ pozitiva internacia juro la ŝtato ne plu povas mem fiksi la altecon de siaj armadoj, sed

la Ligo de Nacioj donas direktivojn por tio. Ĉiam denove tiu fundamenta postulo devas estis elparolata de la pacamikoj. Estas ja vere, ke la fondintaj ŝtatoj mem faris escepton de tiu principo, fiksante tiun principon nur por novaliĝontaj ŝtatoj. La amplekso de la naciaj armadoj de membroŝtato de la Ligo de Nacioj estas formulita per paragrafo 8, en kiu estas i. a. skribite: «*La membroŝtatoj rekonas, ke la konservado de la paco postulas malpliigon de la armadoj ĝis minimumo konforma al la nacia sendanĝereco kaj la plenumo de internaciaj devoj de la Ligo*». Kvankam ĉi tie kiel minimumo ankoraŭ ne estas fiksata «la protekto de la civila loĝantaro», tamen estas klare, ke la postulo de la malarmado neniel povas esti identa kun stabiligo de la nuna stato, sed ke tiu minimumo devas esti profunde *sub* la nuna nivelo. Kiel mezuro por tiu minimumo provizore per la famkonata korespondado inter Clémenceau kaj la germana delegitaro estas rekonita la grado de la malarmado de la venkitaj potencoj. Por la pacamikoj do estas grave, ke ili la bazon jure kaj politike jam atingitan per internaciaj kontraktoj kaj promesoj ne lasu detrui per la sofista elokventeco de la diplomatoj kaj la intrigoj de la militindustrio, ankaŭ ne per la klopodoj de la venkitoj, gajni la egalecon sur pli alta nivelo, nek per la obstina rifuzo de la armitaj ŝtatoj, malsupreniri al la bazo de la malarmitaj.

*La pena vojo.*

Apenaŭ unu kunveno de la Ligo de Nacioj pasis dum la lastaj dek jaroj sen la pritraktado de la malarmada problemo. Praktikajn sukcesojn nur portis la marmalarmaj konferencoj de Washington (1922) kaj de London (1930). La mondpolitika signifo de tiuj konferencoj ne konsistas en la atingitaj ciferoj — ĉar ili fakte ne signifas «malarmadon» —, sed en jeno: Estas fiksita supera limo de la armadoj surmare. Per tio la danĝera armada konkurado por la plej proksima estonteco estas forigata, kaj apud la anglan marpotencon, kiu antaŭ la milito havis la senduban hegemonion, venas la usona ŝiparo kiel samrajta faktoro, tiel ke la vojo al federativa tutmonda komunumo de la ŝtatoj almenaŭ principe estas ebligata. Aliflanke ambaŭ interkonsentoj suferas je fundamentaj mankoj: ili ne signifas «malarmadon», principan forlason de la perforta politiko. La potencorilatoj estas nur stabiligataj, raciigataj, kio denove povos konduki al gravaj konfliktoj, se suprenirantaj potencoj kiel Hindujo, Ĥinujo, Soveta Rusujo postulos partoprenon je la marregado.

*La Malarmada Komitato 1925-1930.*

La ĝenerala malarmado pri ter- kaj aermilitiloj devis esti preparata per la Malarmada Komitato de la Ligo de Nacioj fondita 1925. Ĝia historio estas malmulte ĝojiga. En majo 1927 aperis la unua «projekto» pri malarmada konvencio, kiu en realeco nur devis kaŝi la malsukceson de la unuaj intertraktadoj. En ĉiuj gravaj problemoj la ĉefaj partioj (Francujo, Anglujo, Usono, Germanujo, Italujo) ne interkonsentis. La «potentiel de guerre» (eventuala militkapableco per specialaj kondiĉoj) kaj la problemo de la «sécurité» (sendanĝereco) minacis detrui ĉiujn intertraktadojn. Por nur mencii kelkajn detalojn, kiuj ankaŭ estonte estos gravaj: Ĉu la militmaterialo estu rekte limigita (germana postulo) aŭ nur en la budĝeto (Francujo)? Ĉu la rezervoj estus enkalkulataj en la efektivaj armeanoj (Germanujo) aŭ ne (Francujo), aŭ ĉu la deviga militservo estu tute forigata (angla-usona postulo)? Ĉu estu fondata kontrolkomitato kun nelimigita plenpovo (franca propono), aŭ ĉu tia kontrolo ne estu enkondukata?

Sub la premo de la publika opinio la Komitato ellaboris fine de 1930 projekton sufiĉe ampleksan, kiu servos kiel diskuta bazo por la Konferenco de 1932. Kelkaj paragrafoj estas akceptitaj unuanime, aliaj tre gravaj nur per malforta plimulto. Generale du tendencoj staris unu kontraŭ la alia, venkintaj potencoj kaj venkitaj ŝtatoj, kaj Italujo simpatiis nepre kun la malkontentuloj. La projekto estas deviga por neniu, eĉ ne por la ŝtatoj, kiuj voĉdonis por ĝi. El la enhavo jen kelkaj punktoj.



La armeo estu limigita laŭ la efektiva forto en pacaj tempoj, laŭ la nombro de la profesiaj soldatoj kaj la elspezoj por militmaterialo.

La ŝiparo estu limigita laŭ la nombro de la marsoldatoj, la tunenhavo kaj speco de la ŝipoj kaj la budĝeto por materialelspezoj.

La aermilitiloj estus limigitaj laŭ la nombro de la aeroplanoj kaj aerŝipoj, laŭ la efikeco de la motoroj kaj la amplekso de la aerŝipoj.

La tuta militmaterialo estu nur mezurata laŭ la elspezoj de la budĝeto. La gasmilito estu malpermesata, tiom, kiom la kontraktantaj ŝtatoj ne faras specialajn interkonsentojn pri tio. Senkondiĉe malpermesita estu la bakteriologia milito. Forigo de la deviga militservo ne estas antaŭvidata.

Por simpla homo ĉi tiu projekto jam ŝajnas tre esperiga. Pli ekzakta ekzameno tamen montras danĝerajn malperfektaĵojn, kiuj povas kaŭzi fiaskon de la tuta afero.

*Kritiko.*

La plej evidenta manko estas, ke la projekto tute ne enhavas ciferojn, nek pri la nombro de la soldatoj nek pri la kvanto de la materialo, alivorte: la Komitato estis nekapabla, eĉ nur prove fiksi la mezuron de la malarmado. La batalo pri la nombroj do fariĝos treege politika agado dum la Konferenco mem. La nacioj havas la parolon!

Malfacilaĵojn prezentas la problemo de la limigo de militmaterialo, ĉar tie estas kreata duobla juro. Por la malarmado de la venkitaj ŝtatoj kiel principo la efektiva forto, t. e. la efektiva nombro de la kanonoj, maŝinpafiloj, pafiloj ktp. estas ekzakte difinita. Super tiuj nombroj tiuj ŝtatoj laŭleĝe ne povas armi. La projekto de la Malarmada Komitato nur limigas la budĝeton, kaj ankaŭ tion ne laŭ ŝlosilo unueca por ĉiuj. La danĝero de la metodo estas evidenta. Estas sufiĉe simple, enskribi militelspezojn en aliajn fakojn de la ŝtata budĝeto. Krome la ŝtatoj estas preskaŭ devigataj, teknike perfektigi ĝis plej alta grado la mortigilojn. Iu ŝtato per novaj eltrovaĵoj por la ataka aŭ defenda milito povas gajni nepran superecon sen ŝanĝo de la budĝetaj elspezoj. La efekto de la metodo ne estas malarmado, sed raciigo de la armado, por produkti teknike plej perfektajn mortigilojn per plej malmulte da mono. Same duoblefika estus la neenkalkulo de la milite preparitaj rezervoj, por kiuj ja nur la servotempo estus iel limigata.

Alia danĝero estas la paragrafo 53, kiu, se oni senvestigas ĝin de ĝia diplomata lingvaĵo, diras, ke la nova konvencio neniel povas forigi la regulojn pri malarmado enhavitaj en antaŭaj kontraktoj. Kaj tio signifas, ke por eternaj tempoj ekzistos du klasoj da nacioj, kiuj jure kaj politike estos malsame traktataj rilate iliajn armadojn. Ĉar la problemoj de la nacia honoro kaj de la samrajteco ĉiam pli multe interesas la naciojn ol la malsameco de ciferoj, en tio konsistas granda danĝero. La naciistoj havas armilojn, kiuj ne facile povas esti forprenataj de ili.

Mi raportis pri kelkaj detaloj el la granda batalo pri la malarmado de la nacioj. Multaj gravaj problemoj, kiel tiu de la privataj militistaj asocioj, de la plena militistigo de nacio, la morala malarmado ktp. ne povis esti aludataj. La armadoj sur tero kaj maro kaj en la aero estas unu tuto. Ili estas bazitaj sur sistemo de la timo — kaj perforto-politiko. Se oni ne ŝanĝas radikale tiun tutan sistemon, vera malarmado ne estas atingebla. La imperialismo kaj militarismo de ĉiuj landoj estas danĝera. Sed ĝi estas malfermita klara batalo. Eĉ pli danĝera estas kelkfoje la imperialismo de tiuj, kiuj nomas sin «pacifistoj», se ili uzas sian pacifismon nur por la certigo de imperialistaj celoj. Ĉar tiu memtrompo estas plej ofte neinstruebla, kaj ankaŭ tiu imperialismo denove naskas militojn. Ankoraŭ multaj iluzioj devas esti detruataj (— spirita, morala malarmado! —), antaŭ ol nova mondo povos esti konstruata sur la principoj de la justeco kaj de la samrajteco de ĉiuj. Ni esperu, ke ne estos postulata kiel aĉetprezo homa sango!

# Internacia Junulara Agado

### Katolika Junularo.

**La Katolika Junmetiista Unuiĝo** (Katholischer Gesellenverein) staras antaŭ nova grava paŝo en sia evoluo. 14-17 majo okazis en ĝia nova bela ĉefsekretariejo en Kœln la unua kunveno de ĝia « Generalseniorat » (« ĝenerala senioraro »), internacia komitato de la laika gvidantaro, kiu estonte kunc kun la Ĝenerala Konsilantaro (Generalrat) de la pastraj gvidantoj estos la internacia estraro de la tuta Kolping-familio. La unuiĝo bonege evoluis laŭ ekstera potenco kiel ankaŭ laŭ praktika efikeco kaj interna forto. Fondite de Pastro Kolping, granda sociala apostolo de la junularo, meze de la pasinta jarcento, ĝi nun jam havas pli ol 2100 lokajn unuiĝojn kun 125000 aktivaj membroj en 15 eŭropaj kaj 5 amerikaj landoj. Krome individuaj membroj ekzistas en preskaŭ ĉiuj regionoj de la mondo. Dekduo da gazetoj aperas en germana, nederlanda, hungara kaj angla lingvoj, cetere ankaŭ ĉeha, pola, franca, kroata lingvo kaj Esperanto jam estas uzitaj. Estas ja vere, ke la germana elemento ankoraŭ estas supera al ĉiuj aliaj, sed fakte la gravaj naciaj asocioj de Nederlando (preskaŭ 9000 membroj), Hungarujo (6000) ktp. jam estas tre signifaj. La Junmetiista Unuiĝo posedas 500 proprajn domojn, kiuj servas por kunvenoj kaj kiel hejmoj por la migranta metiista kaj laborista junularo. — Je la unua kunveno de la Generala Seniorаro partoprenis delegitoj el multaj landoj, eĉ unu el Ameriko. La programo enhavis i. a. pritraktadon de la internacia laborperado, de la signifo de la Internacia Labor-Oficejo en Genève, de la realigo de unuiĝaj postuloj en la politiko ktp. La kunsidon, kun kiu samtempe kunvenis la Ĝenerala Konsilantaro de la pastraj gvidantoj, prezidis Msgr. Huerth, pastra ĉefgvidanto.

**PAX ROMANA, Internacia Ligo de Katolikaj Universitataj Studentoj,** festos sian nunjaran kongreson kiel jubileon de sia dekjara ekzisto en la fondiĝurbo Fribourg (Svisujo), 20-25 julio. Prezidanto estas en la nuna jaro Roger Pochon (Svisujo).

**La Katolika Gimnastika kaj Sporta Internacio** (Union Internationale des Oeuvres Catholiques d'Education Physique) havis sian nunjaran ĉefkunvenon la 26 aprilo en Paris. Anstataŭ la ĝisnuna prezidanto Barono de Kerkove estas elektita **Profesoro Hébrard** (Francujo) prezidanto. La kunveno havis antaŭ si peton pri akcepto en la Internacion de la Germana-Kristana Gimnastika Asocio en Ĉehoslovakujo. Ankaŭ la ĉehoslovaka asocio « Orel » subtenis tiun peton. Ĉar la statutoj nur permesas al unu asocio el ĉiu lando aliĝon al la Unuiĝo, oni formis komitaton, por proponi statutŝanĝon, kiu kredeble ebligos la definitivan akcepton de la Germana-Kristana Gimnastikistaro en Ĉehoslovakujo.

**Mondjunularo Katolika** (MOKA) preparas diversajn novajn internaciajn kunvenojn, pri kiuj ankoraŭ estos atentigate. La movado disvastiĝas al kelkaj novaj landoj.

**Internacia Ekspozicio de la Katolika Junularo** okazis tuj post la Kongreso de la Belga Katolika Junulara Asocio en Bruxelles, 29 aŭgusto ĝis 7 septembro. Ĝia ejo estos la Instituto de Saint-Louis. En tiu ekspozicio partoprenos laŭ speciala invito ankaŭ MOKA.

**La slavaj katolikaj studentaj ligoj** havos en julio nunjara internacian konferencon en Bratislava (Ĉehoslovakujo).

### LA SKOLTOJ.

**La Internacia Skolta Oficejo en London** jus sciigas, ke la nombro de la skoltoj aliĝintaj al la Internacia Oficejo fine de 1930 estis 2.031.274. Depost la antaŭa jaro la nombro kreskis je 123.502 membroj. La Internacia Skolta Konferenco nunjara okazos en aŭgusto en Wien, internacia kunveno de roveroj (pli aĝaj skoltoj) estos en Kandersteg, kaj skoltoj el slavaj landoj havos internacian kunvenon en Praha.



**En Nice** (Francujo) je la naskiĝtago de Baden-Powell, fondinto de la skolta movado, la 22 februaro estas inaŭgurita de francaj skoltoj internacia skolta hejmo (foyer international), kiu bonvenigos skoltojn ĉiulandajn same kiel la similaj institucioj en Bruxelles, Genève, Luzern, Kandersteg ktp.

**Ĉe la Internacia Kolonia Ekspozicio en Paris** troviĝos speciala skolta restaŭracio, kiu estos je tre favoraj kondiĉoj utiligebla de skoltoj ĉiulandaj.

**Esperantista Skolta Tendaro ĉe Budapest**, pri kiu ni jam informis, estas fervore preparata. Je la unua fojo oficiala nacia skolta asocio formale invitis. La Hungara Skolta Asocio (Magyar Cserkészszoevetség) sendis specialan cirkuleron al ĉiuj skoltaj ligoj en la mondo, invitante ilin, delegi Esperantistan skolton al la tendaro. En kelkaj landoj specialaj favorajoj estas donataj al partoprenantoj.

### Hebrea Junularo.

**La Universala Unuiĝo de la Juda Junularo** en sia lasta kongreso okazinta 3-7 aŭgusto 1930 en Genève, i. a. ankaŭ okupiĝis pri la fenomeno de la plimultiĝo de konvertiĝoj de judoj al la Katolika Eklezio. Jen, kion diris S-ino Tug-Simon: «Kiel ne kompreni la kaŭzon de la katolikiĝo, se oni konstatas, ke la oficiala judismo klopodas sisteme ignori la kristanismon, kio metas nian junularon en absolute malĝustan situacion? Ĉu oni volas aŭ ne, ni vivas en kristanaj landoj. Niaj infanoj vizitas lernejojn kaj tie legas Bossuet, Fénélon, Pascal. Ili rigardas katedralojn, kiel en Chartres aŭ Paris, aŭ aliajn mirindajojn, en kiuj manifestiĝas kristana kredo. La kristanismo malgraŭ ĉio aperas al ili kiel granda fakto de la historio, pri kiu iliaj edukistoj, profesoroj kaj rabenoj, volonte silentas, kvazaŭ ili sentus sin ĝenitaj, eldiri opinion kaj doni klarigon. Kial? La juda religio, kia ĝi estas instruata al ili, fatale aperas al ili kvazaŭ ajo el antikva epoko, elmodiĝinta, nekapabla nutri la intelekton kaj respondi al la bezonoj de la koro... Se ili estas religiemaj, kiel tiam ili rezistu la dolĉecon de la vortoj de l'Nova Testamento?... Ni do havas en nia moderna judismo tiun mankon: la ignoron de la Evangelio kaj de la kristanaj originoj. Nia junularo devas kompreni, ke Jesuo, sur kies persono la kristanismo estas bazita, estis **judo**, ke liaj plej belaj instruoj estas floroj kreskintaj je la centjara arbo hebrea, ke li vivis kaj mortis kiel judo kaj ke li neniam forjetis la religion de sia popolo en ĝia plej pura esenco, sed ke kontraŭe li estas kun Moseo nia plej granda profeto» — Sendube tiaj vortoj, por tute ne paroli pri tio,ke la parolantino ne parolis pri la rolo de la judaj religiestroj je la morto de Jesuo, signifas akran kontraston al la tuta juda tradicio ĝisnuna. Aŭ ĉu vere iam realiĝos la vorto de la amerikana rabeno Enclow, ke «iam Jesuo servos kiel ligilo inter judoj kaj kristanoj »?

### Socialista Junularo.

**La estraro de la Socialista Junulara Internacio** kunsidis la 15 februaro en Berlin. La sekretario Olienhauer donis la raporton, el kiu vidiĝas, ke la Socialista Junulara Internacio nun havas iom pli ol 250000 membrojn. La plej grava okazajo de la lasta jaro estis la Internacia Somerkurso en Innsbruck (Aŭstrujo), en kiu partoprenis 28 gekamaradoj el 11 naciaj asocioj. Grava estis la Internacia Junulara Tago, kiun SJI ĉiujare organizas la unuan dimanĉon de oktobro kaj kiu 1930 estas festita en 18 landoj sub la devizo: «Kontraŭ la faŝismo!» Por akceli la socialistan junularan agadon en balkanaj landoj, okazis Balkana Konferenco de la Socialista Junulara Internacio la 10 oktobro en Sofia (Bulgarujo). Nove akceptita en la Internacion estas la Socialista Junularo de Luksemburgo. Oni speciale priparolis la agadon en Polujo kaj Germanujo kaj decidis estonte eldoni pli multe da propagandiloj en franca kaj angla lingvo. La sekvonta kunsido de la Ekzekutiva Komitato okazos la 18 septembro en Taennich (Germanujo), ĝi decidos i. a. pri la IV-a Internacia Socialista Junulara Kongreso, por kiu estas proponita printempo 1932 en Svisujo. Oni volas prepari specialan agadon por malarmado. Antaŭ la kunsido de la Ekzekutiva Komitato okazos ĝenerala internacia kunveno de gvidantoj.

**Senlaboreco kaj Protekto de la laboranta junularo** estis problemoj, kiuj speciale okupis la estrarkunsidon de la Socialista Junulara Internacio. La fina rezolucio ŝajnas

al ni sufiĉe interesa, por plene represi ĝin: «La estraro de la Socialista Junulara Internacio konstatas, ke la senlaboreco kaŭzita per la internacia ekonomia krizo ekprenas ĉiam pli grandajn rondojn de junaj laboristoj. La Socialista Junulara Internacio invitas la aliĝintajn asociojn, koncentriĝi en kontakta kun la partioj kaj sindikatoj ĉiujn fortojn al la kontraŭbatalado de la senprofesieco kaj senlaboreco de la gejunuloj. En la senco de la junularprotekta programo de la SJI, la estraro rekomendas plej bone atenti jenajn postulojn:

1. Malplilongigo de la labortempo por gejunuloj.

2. Zorgo pri senlaboraj gejunuloj precipe utiligo de gejunuloj por helplaboroj, akcelado de pliperfektigaj kursoj, subteno de senlaboraj gejunuloj, kreo de dumtagaj restejoj ktp.

3. Dono de laŭleĝa refreŝiga libertempo por gejunuloj.

4. Deviga vizito de pliperfektiga aŭ profesia lernejo, ne nur por metilernantoj, sed ankaŭ por junaj helplaboristoj malpli ol 18 jaraj.

5. Plilongigo de la ĝenerala lerneja devo.

**Komunista Junularo.**

**Internacia Infana Semajno** okazis 1-14 majo en multaj landoj, por propagandi revoluciajn kaj komunistajn ideojn jam en la infanaro. Eĉ lernejajn strikojn oni organizis.

**La « spartakiado »**, internacia bolŝevista sportfesto, okazos en julio en Berlin. Oni atendas multajn partoprenantojn el Soveta Rusujo.

**La komunista junulara gazetaro** nun en speciala maniero evoluiĝas. La germana gazeto « Die Junge Garde » (la juna gvardio), kiu nun aperas dufoje en la semajno kaj povis festi la 1 aprilo 1931 sian 25 jaran jubileon, volas fariĝi ankoraŭ en ĉi tiu jaro ĉiutaga jurnalo. La gazeto « Junulara Internacio » eldonata en diversaj lingvoj depost 1930 regule enhavas kurs-kaj instrumaterialon de la Agitpro-Sekcio de la Ekzekutiva Komitato de la Komunista Junulara Internacio en Moskva, por servi efikan propagandon.

**Anarkiista Junularo.**

**La Anarkiista Junulara Internacio** intencas estonte eldoni sian internacian informservon, kiun ĝi ĝis nun regule monate eldonis nur en Esperanto kaj ankaŭ sendadas al MOKA, ankaŭ en naciaj lingvoj, por atingi pli vastajn rondojn. — Kongreso, kiun AJI volis organizi en Danujo, pro nesufiĉa kunlaboro ne realiĝis.

**Pacifista Junularo.**

**La Mondjunulara Migrada Servo** kredeble disiĝos en du partojn, kies unu speciale laboras inter vivreformemaj rondoj, dum ke la alia ĝenerale peradas junularvojaĝojn. La unua restos kunligita kun la junularaj rondoj, kiuj havas sian centron sur la junulara kastelo Freusburg.

**Pacifista Junulara Kunveno** por Belgujo, Nederlando, Germanujo, Francujo kaj Luksemburgo okazas dum la pentekostaj tagoj en Liège (Belgujo).

**La du junularaj tendaroj** en Vessigebro (Svedujo) kaj Chevreuse (Francujo) estu speciale rekomendataj al niaj gelegantoj. Detaloj en la kongreskalendaro de la antaŭa numero de J. B. Ambaŭ kunvenoj uzos kaj propagandos Esperanton.

**La Internacia Komitato por Demokrata Pacagado** fondita kaj gvidata de la franca katolika pioniro Marc Sangnier okaziĝis en ĉi tiu somero novan internacian junularan militiron por la paco tra Germanujo. Ĝi servu la germanan-francan kaj germanan-polan interpaciĝon kaj finiĝos per kongreso en la germana junulara kastelo Rothenfels am Main, ejo de la katolika junulara ligo Quickborn.

---

**N-ro 1** de la 6-a jarkolekto nun venas al vi. Tio signifas, ke vi devas nove pagi vian abonkotizon! Faru tion tuj, kaj ŝparu al ni zorgojn, laboron, tempon kaj monon! Dankon!



# Benataj estu la pacigantoj!

Meze inter la grandaj taskoj, kiuj urĝe atendas sian solvon, unu estas de nemezurebla graveco: la paco en la koro. Se armita konflikto inter la homoj jam ĉiam signifis grandan malfeliĉon, estonta milito estus nepriskribebla teruro. Krom gigantaj materiaj perdoj, neniigo de tutaj ŝtatoj, detruo de milionoj da homaj vivoj, estonta milito alkondukus la moralan pereon. Kaj la respondeco antaŭ la Savinto pri tiu krimo?

Se do ekzistas laboro inda de la homaro, tiam ĝi estas la laboro por la konservado de la paco.

Benataj estu tiuj, kiuj servas tiun taskon!
Benataj estu tiuj, kiuj batalas kontraŭ malnoviĝintaj opinioj!
Benataj estu tiuj, kiuj malfermas la okulojn de la blinduloj!
Benataj estu tiuj, kiuj penas klarigi la miskomprenojn!
Benataj estu tiuj, kiuj suprenleviĝas super la sovaĝa naciismo kaj per siaj pensoj kaj koroj volas ĉirkaŭpreni la tutan homan familion!

Honoron al tiu konsekvenco, al tiuj herooj, kiuj posedas la kuraĝon, diri: «Ni ne volas servi tiun krimon!» Nekomprenataj, eble eĉ primokataj, tiuj justuloj nun ankoraŭ devas multe suferi. Sed la estonteco skribos ilian nomon per oraj literoj, kaj la ĥoro de la dankemaj voĉoj jubilos: Jen tiuj, kiuj malsuprenbatis la malnovan frenezaĵon; honoro estu al ili, ĉar ili anoncis veran kristanismon!

Pastro Grafo Jan Rostworowski S. J., Krakow.

---

# Junularo en Okcidenta Afriko

Charles Guillon el la Mondkomitato de la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj (YMCA) reveninte de kelkmonata restado en la okcident-afrika marbordo raportis siajn impresojn en jena maniero.

La evoluo de tiu tuta regiono de Okcidenta Afriko inter Senegal kaj Kongo jam komenciĝis antaŭ la milito, nun en gigantaj paŝoj antaŭenmarŝas. Tiu regiono, hodiaŭ nur parte ekonomie ekspluatata, estas unu el la grandaj landoj de la estonteco. Ĉiaj urboj rapide kreskas. Kaj la negra junularo enfluegas en ĝiajn ekonomiajn centrejojn kaj marbordajn urbojn. Samtempe kun tiu venado de la okcidenta ekonomia civilizo la malnova idolanismo denove levas sian kapon, kaj en multaj lokoj la loĝantaro reeniras al sia malnova barbara kulturo kaj kutimaro, kiuj estas renoviĝataj kiel simboloj de reviviĝanta naciismo. La indiĝenaj gvidantoj malrekomendas la portadon de eŭropaj vestaroj, kaj ĉie la malnovaj fetiĉoj reaperas. La islamo havas fortegan influon: ekzemple la urboj Dakar kaj Kano estas hodiaŭ preskaŭ tute mahometanaj.

Tia estas la ĉirkaŭaĵo, en kiu troviĝas la kristana junularo de Okcidenta Afriko. Ĝi kuniĝas, kolektas monon kaj esperas helpon de la eŭropaj kaj amerikaj misiistoj. Ĉi tiuj misioj, kiuj faris la plej sindonan laboron, nun vidas sin antaŭ neplenumebla tasko. Ĝi tie sendube estas urĝa alvoko al kristanaj junularaj asocioj, ke ili komencu agadon, speciale en la marbordaj urboj kaj ekonomiaj centroj. Unu el la plej memkompreneblaj taskoj estas, havigi al la juna generacio librojn kaj propogandilojn, kiuj adaptiĝas al la afrikaj bezonoj. De tio hodiaŭ nenio ekzistas. Hodiaŭ tiuj junaj homoj estas atakataj de ĉiuj religiaj, moralaj kaj socialaj problemoj, kiuj estas kunligataj kun la eŭropana influo, kaj vere ne mankas falsaj ŝafistoj, kiuj provas erargvidi ilin.

---

**UNU NOVA ABONANTO** certe facile estus varbebla de vi. Duobligante sian abonantaron, LA JUNA BATALANTO povus fari belan progreson antaŭen! Konsideru tion, kaj varbu! Nun ja komenciĝas la nova jarkolekto de via kaj nia gazeto!

**BELAJ LAŬDAJ VORTOJ** pri La Juna Batalanto ofte venas al ni kaj ĝojigas nin. Sed per ili ni ne povas pagi la altajn kostojn de nia organo. Por tio ni bezonas — bedaŭrinde — monon! Do abonu, varbu abonantojn, kaj ne forgesu nian Jubilean Kolekton!

## NOVAJ VOJOJ DE LA EDUKADO EN AFRIKO

La Internacia Instituto por Afrikanaj Lingvoj kaj Kulturoj, kiu enhavas plej vastajn rondojn de interesitoj pri Afriko, ĵus faris gravan decidon. Ĉi tiu volas certigi por la afrikana junularo la rajton je edukado en ilia gepatra lingvo; la hodiaŭ ĝenerale akceptita principo, ke la infano estu instruata en sia propra lingvo, estu ankaŭ akceptata por afrikanaj geknaboj. Malzorgado de la indiĝena lingvo signifas danĝeron, kripligi aŭ detrui la kreantajn fortojn de la lernanto, devigante lin, esprimi sin en lingvo, kiu estas fremda al lia naturo kaj raso. Tial laŭ la propono de la Instituto la instruado okazu en la unuaj tri jaroj nur en la indiĝena lingvo. Sed ankaŭ poste, kiam la infano komencas lerni eŭropan lingvon (esperteble baldaŭ Esperanton!), la aliaj lecionoj estu donataj en la negra lingvo. Eĉ post kiam en la pli supera instruado eŭropa lingvo estas preferata, la indiĝena lingvo estu ne malzorgata, sed ĝi fariĝu objekto de speciala studo celanta al pliriĉigo de la lingvo kaj kreado de propra literaturo.

## Komunismo kaj Junularo en la Ekstrema Oriento

La Komunista Junulara Internacio kreskas laŭ grandeco kaj signifo kiel sekcio de la Komunista Internacio. «Pravda», la ĉeforgano de la partio en Moskva, raportas pri atentinda aktiveco de la junaj komunistoj en Germanujo, Anglujo, Polujo kaj Ĉeĥoslovakujo. Sed la plej rapida disvastigado de komunistaj idealoj okazis en Ĥinujo, kie la partio organizis multnombrajn junularajn asociojn, el kiuj la plej grava estas la Juna Gvardio, organizaĵo tute kamparana, kiu en la lasta jaro kalkulis kelkajn centmilojn da membroj kaj kiu nun laŭdire havas ĉirkaŭ unu milionon da membroj. «Ĝi organizas regimentojn — la tiel nomatajn Ruĝajn Kamaradojn, kiuj formas la rezervotrupojn de la Ruĝa Armeo de Ĥinujo. La membroj de la Juna Gvardio faras ĉiujn laborojn, kiujn ni donas al ili, eĉ se tio estas danĝera por ilia vivo. Ankaŭ granda nombro da ĥinaj junulinoj partoprenas en la laboro de la Juna Gvardio. En la sovetaj regionoj la Junaj Gvardioj helpas la Partion kaj la Komsomolon (Komunistan Junularan Asocion) en la dispartigado de la tero inter la malriĉaj kaj senteraj vilaĝanoj. Ili batalas aktive kontraŭ terposedantoj, feŭdaluloj, uzurpantoj. La Ĥina Komsomolo (Komunista Junularo), kreinte la Junajn Gvardiojn en la vilaĝoj, decidis transigi tiun agadon ankaŭ en la urbojn».

Komunismo ankaŭ trovas simpation inter la junularo de Japanujo. Kagawa skribas en sia gazeto pri la enpenetrado de Komunistoj en diversajn socialajn organizaĵojn. Li mem faris spertojn pri tio kaj raportas speciale pri la maniero, kiel la Studentaj Kooperativaj Asocioj, kiujn li fondis, estas superkuritaj per ili. Li klarigas la simpatian impreson de la komunismo al la junularo en jena maniero:

1. La komunistoj substrekas ne la teorion, sed la praktikon. Materialismo plaĉas al la junaj homoj, ĉar ĝi ŝajnas konkrete utila.

2. Lenin, Stalin, Bucharin ktp. ĉiuj aprobas perforton kiel metodon, kaj tio plaĉas al la senpacienca juna generacio.

3. La Komunista Partio havas interpretadon kaj vidpunkton pri la industria revolucio kaj programon por ĝi. La junularo ne ŝatas individualistan socialan liberecon, sed kooperativan solidarecon kaj tial volonte kunlaboras kun la Komunista Partio.

Laŭ «The Week», Bombay.

**SENDANTE VIAN ABONKOTIZON** por la nova jarkolekto, vi eble deziras, samtempe aboni ankaŭ la belan dusemajnan gazeton KATOLIKA VIVO, kiu ne estas aparte abonebla. Rimarku nian specialan informon pri tio!



# Gravaj Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj 1931

Jen aldono al la unua listo, kiun ni publikigis en la marta numero. Pri detaloj, programoj ktp. skribu al la cititaj adresoj. La listo estas daŭrigota kaj kompletigota. Ni atentigas, ke la citado **ne** ĉiukaze signifas senrezervan rekomendon de la kongreso aŭ de la invitanta asocio.

| | | |
|---|---|---|
| 22-23 majo | **Liège** Belgujo | Internacia Pacifista Limkunveno por Belgujo, Francujo, Germanujo kaj Nederlando. Mme Verheyen, 21, Boulevard d'Avroy, Liège. |
| 24-25 majo | **Liège** | Internacia Pacifista Junulara Kunveno. Egon Formanns, Kraemerstrasse, 14, Aachen, Germanujo. |
| 1-5 junio | **Berlin** | XIII-a Internacia Kongreso por Loĝado kaj Urbkonstruado. 25, Bedford Row, LONDON WC 1. |
| junio | **Paris** | Kongreso de la Internacia Metiista Instituto, 40, Rue des Vinaigriers, Paris. |
| 25-25 junio | **Genève** | Internacia Konferenco pri la Afrikana Infanaro. Union Internationale de Secours aux enfants, 31, Quai du Montblanc, Genève. |
| 27 junio -4 julio | **Praha** | Internacia Tendaro de Skoltoj el slavaj landoj. Boy Scouts International Bureau 5 Buckingham Palace Road, LONDON SW 1. |
| 15-30 julio | **Wien** | Internacia Socialista Kongreso. Zürich 2, Stockergasse, 41, Svisujo. |
| 20-25 julio | **Fribourg**, Svis. | Internacia Katolika Studenta Kongreso de PAX ROMANA. Collège S. Michel, Fribourg. |
| 16 julio -11 aŭgusto | **Chevreuse**, Francujo | Internacia Junulara Tendaro. Trait d'Union, 73bis rue Bobillot, Paris, XIII. |
| fine de julio | **Bratislava**, Ĉeĥoslov. | Internacia Konferenco de la Slavaj Katolikaj Studentaj Asocioj. Niko Kuret, Miklosiceva, 5, Ljubljana Jugoslavujo. |
| 20 julio-1 aŭgusto | **Krakow**, Polujo | Tria Internacia Pedagogia Kurso de Esperanto (de pastro Andreo Ĉe). Ĉe-Instituto de Esperanto, Oostduinlaan, 9, Den Haag, Ned. |
| 25 julio-11 aŭgusto | **Kandersteg**, Svisujo | Internacia Rovera (Skolta) Tendaro. Boy Scouts, International Bureau, 5, Buckingham Palace Road, London SW 1. |
| 2-7 aŭgusto | **Amsterdam** | Internacia Proletaria Esperanto- Kongreso (SAT). SAT, 23, rue Boyer, Paris XX. |
| 3-7 aŭgusto | **Paris** | Internacia Stenografia Kongreso (kun Esperanto-aranĝoj). M. Griffon, 52, rue de Chabrol, Paris X. |
| 3-8 aŭgusto | **Genève** | IV-a Internacia Pedagogia Kunveno pri la Ligo de Nacioj. Bureau International d'Education, 44, rue des Maraichers, Genève. |
| aŭgusto | **Wien** | Internacia Skolta Konferenco. Boy Scouts, International Bureau, 5, Buckingham Palace Road, LONDON SW 1. |
| aŭgusto | **Eindhoven**, Nederlando | Generala Kunveno de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). S-ro Schendeler, Prins Hendrikstr., Eindhoven, Ned. (Kongreso kredeble en ĉi tiu jaro ne okazos). |
| aŭgusto | **Rothenfels**, Germanujo | Internacia Demokrata Paca Kongreso, 34, Bd. Raspail, Paris VI, (Antaŭe «Paca Krucmilito» tra Germanujo). |
| 29 aŭgusto-7 septembro | Bruxelles | Internacia Ekspozicio de la Katolika Junularo. A. C. J. B., 48a, Rue V. Decoster, Louvain. Belgujo. |
| 1-3 septembro | **Bruxelles** | Internaciaj Tagoj de la Katolika Junularo A. C. J. B., 48a rue V. Decoster, Louvain. |
| 9-11 septembro | **Antwerpen** | Internacia Kongreso de la Kristanaj Sindikatoj. Confédération internationale des Syndicats Chrétiens, 12, Drift, Utrecht, Ned. |

# ALLGEMEINE RUNDSCHAU

## Wochenschrift für Politik und Kultur, Herausgegeben

### - von Dr. Georg MOENIUS -

Steht im 28. Jahrgang und hat sich nach dem Urteil der Presse « prächtig verjüngt ». Ein **erster Mitarbeiterstab** nimmt in **programmatischen Aufsätzen** Stellung zu allen Fragen der Religion, Kultur und Politik. Die Rubrik « **Blicke auf die Zeit** » gibt eine Uebersicht, die die verwirrenden Tagesereignisse klären und beurteilen hilft.

**Keiner** Partei dienstbar, abendländisch und völkerversöhnend. An Sondernummern sind erschienen : 2 Abendland-, 4 Belgien-, 2 Russland-, 1 Polen-, 1 St. Augustinus-Nummer, 2 Nationalsozialismus-Nummern.

## Urteile über die Allgemeine Rundschau :

« Die Zeitschrift hat Geist und Charakter. Ich freue mich auf jede Nummer. » (Pfarrer W. in B.)

« Aus dieser so prächtigen und hochstehenden Zeitschrift gewinne ich Belehrung, Anregung, eine tiefere Einsicht in die Belange von Kultur und Politik, und es soll mir eine selbstverständliche Dankesschuld sein, immer wieder auf die Vorzüge der Allgemeinen Rundschau empfehlend und werbend hinzuweisen. » (S. K. in Greven)

« Endlich einmal auch ein katholisches Blatt, das für die Wahrheit eintritt ! Es hat wirklich heute eine Mission, die katholische, zu erfüllen. Gott schütze und stärke es ! (Ein Universitätsprofessor der kath. Theologie).

« Ich will ganz offen vor aller Welt meine Meinung sagen : Mit heiliger Freude hat es mich erfüllt, dass sich Ihre Zeitschrift mit solch wohltuender Aufrichtigkeit in den Dienst der wahren Friedensvermittlung gestellt hat. » (Ein Universitätsprofessor der kath. Theologie).

« Endlich haben wir eine katholische Zeitschrift, wie wir sie seit langem ersehnten. Oh, dass doch unsere sogenannten « katholischen » Zeitungen von der Allgemeinen Rundschau lernen möchten ! Gott segne ihr Wirken ! » (Pfarrer H.)

« Ich bin zur Ueberzeugung gekommen, dass Ihre Zeitschrift die wahrheitsliebendste, kulturell höchststehendste, geistig und stilistisch vornehmste ist. » (F. K., Ehingen, 22.4.31).

Verlangen Sie Probenummern oder bestellen Sie ein Probeabonnement zum Vorzugspreis von M 3.— für das Vierteljahr !

**Verlag der " Allgemeinen Rundschau ,,**
**München, Galeriestr. 35 a**



# DIE ERSTEN ZWEI SEITEN

die die allwöchentlich mit Spannung erwarteten

## ZEITGÄNGE

enthalten, fesseln immer neue Leser an „Das Neue Reich".
Das einmütige Urteil der Leserschaft:
Scharf geschaut und meisterhaft geschrieben:
Wie die Zeitgänge so die Aufsätze und Rundschauen dieser einzigartigen, modernen kulturpolitischen Wochenschrift.
Verlangen Sie von der Verwaltung des „Neuen Reiches", Wien, VI., Mariahilferstraße 49, die kostenlose Probezusendung des Blattes durch 4 Wochen.

✂ Hier abtrennen und als Drucksache einsenden!

**An die Verwaltung „Das Neue Reich"**
Wien, VI., Mariahilferstraße 49

Ich wünsche ein k o s t e n l o s e s Probeabonnement für 4 Wochen (Erfolgt nach Ablauf dieses Probeabonnements keine Abbestellung so gilt dies als Bezugsanmeldung.)

Name: ______________________
Stand: ______________________
Genaue Adresse: ______________________
Datum: ______________________

## - Das ideale, herrliche Geschenk -

ist die prächtig[illegible]
Bildmappe

# Maria geht über die Erde

10 farb. Tuschzeichnungeu von Lore Gronau. Text von Franz Herwig. Preis 4.50 Mark.

Der bestens kekannte katholische Dichter Franz Herwig schrieb den Begleittext zu diesen feinen Bildern. Zu ihnen konnte aber auch nur ein Dichter schreiben, der in gleicher melodiöser, harmonischer Weise Worte setzte, wie die Künstlerin mit Zeichenstift und Farben zarte, tiefinnerliche Gedichte malte, von der Verkündigung und von dem Gang üb rs Gebirge, von dem frohen weihnachtlichen Geschehen damals und heute, von Maria, der Königin. Man wüsste nicht, was besser auf den Geschenktisch passen dürfte, als dieses " Marienleben ,, in Wort und Bild.

Die einzelnen Bilder können auch aus der Mappe herausgenommen werden zum Einrahmen, zu Geschenkzwecken.

- **Hoheneck-Verlag GmbH., BERLIN SW 48** -

NEU ERSCHIENEN!

## Wilhelm Achtermann

**v. P. Innocenz M. Strunk O. P.**

Ein westfälisches Künstlerleben. XVI und 272 Seiten. Grossoktav. 41 Tafeln. Gebunden 8.70 Mk.

. . Ihr Achtermann hat Vielen etwas zu bieten. Und ich wünsche, es mögen Ihr Werk alle in die Hand nehmen, die Erzeugnisse seiner Kunst auf heimischem Boden oder in Böhmen und Steiermark und Rom vor Augen haben können. Darüber hinaus darf es als vorzüglicher Kommentar eines ganz ideal gerichteten Künstlerlebens gelten.

Fr. Andreas Kard. Frühwirth, Rom. Kanzler der hl. Röm. Kirche.

. . 41 vorzügliche Tafeln von dem Künstler und seinen Werken schmücken das Buch. Der Preis des stattlichen Bandes ist als sehr niedrig zu bezeichnen.

Bonifatiusbote (Fulda).

**Albertus-Magnus-Verlag, Vechta i. O.**

**Albertus-Magnus-Verlag**
VECHTA I. O.

Die Mystikerin des Apostolates

## Sankt Katharina von Siena

**die römisch-katholische Heilige.** Von Abbé Jacques Leclercq. Berechtigte Uebersetzung aus dem Französischen v. P. Albertus M. Kaufmann O. P. Okt. XVI u. 406 S. Brosch. *RM* 4.20, 5.20 schw. Fr. Geb. *RM* 6.-, schw. Fr. 7.45

Das hier angezeigte Buch ,,St. Katharina von Siena" zählt zu den besten Heiligenleben, die wir bekommen haben. Auf Grund langjähriger Quellenstudien zeichnet L. (den P. A. K. sehr fein übersetzt hat) die Zeit, die Umwelt, die religiöse Persönlichkeit, die Wirksamkeit der apostolischen heiligen Frau von Siena. Für den Laien, besonders für die gebildete Frauenwelt, ist dies Werk wegweisend, zumal im Geiste einer innerlich-begründeten Mitarbeit im Apostolat an den Aufgaben der Kirche in unseren Tagen.

Univ.-Prof. A. Donders.

Neu erschienen **ROSENKRANZ-KALENDER 1932.**
Quartformat Preis M. 0,75
**Albertus-Magnus-Verlag, Vechta i. O.**